

La Honoraj Membroj de ISAE

Josef Kavka

naskiĝis la 25-an de aprilo 1922 en *Hořovice* (meza Bohemio) kaj jam kiel junulo kontaktiĝis kun la Internacia Lingvo: lia patro komunikis kun *Zamenhof* mem. Estis pro la profunda lernado de la latina kaj greka lingvoj, ke d-ro *Kavka* nun estas unu el la plej kompetentaj (kaj pro tio ankaŭ sufiĉe timataj) kritikaj gardistoj de la apliko de “scienca Esperanto”. Li studis geologion kaj specialiĝis pri petrologio. En multaj diversrevuaj artikoloj li publikigis pri genezo, evoluo, minerala kaj ĥemia konsisto de rokaĵoj kaj pri aliaj geologiaĵoj.



Bildo 1: Li forte kritikas la malordon en planlingvo kaj kondamnas, se sam-etimaj terminoj estas traktataj malsimile: d-ro *Josef Kavka*

En 1948 li fariĝis ISAE-membro, en 1965 li fondis kaj gvidis “geologian faksektion” kaj transprenis la taskon de ĝenerala sekretario de ISAE (1971-1987), ĉefredaktoro de *Scienca Revuo* (1978-1987) kaj funde kontribuis al la renomo de Esperanto en scienco kaj teĥniko. Li estas Honora Membro de ISAE kaj ankaŭ de ĈEA (Ĉeĥa Esperanto-Asocio) kaj de UEA.

Rob Moerbeek

naskiĝis la 1-an de majo 1936 en Harlema, Nederlando, el gepatroj socialismaj, esperantistoj instruistaj, kiuj ebligis universitan studadon al siaj 4 gefiloj. Anstataŭ daŭrigi instrui la grekan kaj latinan lingvojn (1963-69) li fariĝis profesia esperantisto kaj laboris ekde 1969 kiel oficisto de UEA zorgante pri la ekspedofako de la Centra Oficejo (CO) kaj provlegado de la UEA-revuo “*Esperanto*” kaj aliaj periodaĵoj, kaj sekvis s-inon *A.J. Middelkoop* kiel privatdocento pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo (1978-1998). En 2001 li emeritiĝis sed ne ĉesas prizorgi la Bibliotekon *Hodler* kaj korekti la revuojn *Monato*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Scienca Revuo*, *Fen-X* (Esperanto *Nederland*), *Esperantista Vegetarano*, *La Kontakto* (nederlanda LIBE-sekcio). La agado por handikapitoj, precipe blinduloj, estas proksima al li.



Bildo 2: Nun ankaŭ Honora Membro de UEA: la fidela kontrolleganto de *Scienca Revuo Rob Moerbeek*

En 2000 *Rob Moerbeek* ricevis la Premion *Deguĉi* kaj li fariĝis Honora Membro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) en 2006 en la asocia centjariĝifesto en Tavoletto, Italujo. Kaj nun, en la 96-a UK en Kopenhago, li ankaŭ elektiĝis Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Tre koran gratulon, kara Rob!

(Prof. d-ro *R. Sachs*, prezidanto de ISAE)

Fonetika malordo en la planlingvo

Josef KAVKA

Esperanto emas reprezentiĝi – kontraŭe al la lingvoj naturaj – kiel **lingvo planita**. Tamen, ĝia leksiko scienca ŝajnas impresi aparte **malplanlingva**...

La plej okulfrapa situacio ekzistas pri la fonemoj Ĥ kaj K, resp. ĥ kaj k. Ekzemple la bavaria metropolo *München* (ne *Münken*!) fariĝis “*Munkeno*”, spite al la originalo kaj al la **zamenhofa Munĥeno**... Sed la plej fatala estas la trudado de K en la sferoj terminologia kaj nomenklatura: la **fundamentaj ĥemio** kaj **ĥameleono** aperas kun la komencaj K. “*Ĥameleono*” greke signifas “malaltan leonon”. Aliflanke “*kamelo*” kaj “*kamelio*” referencas al etimo tute alia.

Abundaj ekzemploj dokumentas en NPIV (2002) fortimige arbitran traktadon de sciencaj nomoj: “*kenozoiko*” estas prava, devenante el la greka *kainos* = nova. Male “*kenopodio*” devus fariĝi **ĥenopodio**, devenante el la greka *ĥenos* = ansero kaj *podion* = piedeto, ja la foli-konturo iom rememorigas anseropiedon, jen kial la vernakla germana nomo “*Weißer Gänsefuß*” por *Chenopodium blanca* estas ekzakte “*Blanka Anseropiedo*”!

Aliflanke absurdaj estas duopoj sam-etimaj, sed en la Esperanta vortarego malsame traktitaj **dolifoto** apud “*dolikocefalo*”, **stilio-****metrio** sed “*polistiko*”, **ĥoro** sed “*koreografio*” kaj tiel plu, kaj tiel plu, kaj tiel plu. Ĉu tio impresu planlingva, se lingvoj tute naturaj procedas pli orde?

Adreso de la aŭtoro

RNDr. *Josef KAVKA*, CSc.

Lužná 7 – Vokovice

CZ 160-00 Praha 6 / Ĉeĥio

Priaŭtoro informo

Profesie geologo. Honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).